

AGEI raporto 2009

Dum la jaro 2009 AGEI plenumis sian rolon kaj agis laŭ sia statuto.

Ne estis ŝanĝoj en la estraro.

prezidanto: Zsófia Kóródy

vicprezidanto: d-ro Rudolf Fischer

kasisto, membroadministranto: Christof Krick

estrarano: Harald Schmitz

kasrevizoroj: Wolfgang Bohr, Karin Klose

Membraro: la nombro de membroj restis stabila, kun ĉ. 80 membroj dum 2009 la plej granda landa sekcio de ILEI. Tamen, la membraro maljuniĝas, ni devas instigi junulojn aliĝi al la asocio.

La membrokotizo ne ŝanĝiĝis, kostas EUR 25,- jare. Familianoj ricevas rabaton.

Por novaj membroj aliĝilo troviĝas ĉe la AGEI-retpaĝo <http://esperanto.de/agei> sub menupunkto Aliĝo. Viajn demandojn pri membriĝo, kotizado bv. sendi al nia kasisto:

Christoph Krick, Günninghauser Str. 11a, 59955 Winterberg, christof.krick@esperanto.de

Agado:

1. Lerneja instruado

Ni ofte emfazas, kiom grave estas oferti Esperanto-kursojn en la kadro de lerneja instruado, montri nin, nian lingvon tie, eluzante la pedagogiajn valorojn, la rapidan lerneblon de la internacia, neŭtrala lingva komunikilo. Bv. ne forgesi, ke AGEI donas organizajn, metodikajn konsilojn kaj helpas per instrumaterialoj, instruhelpiloj al tiuj gekolegoj, lernejoj, kiuj tion bezonas, petas.

Estas ĝojige, ke ankaŭ en 2010 estas 10-15 lernejoj, kiuj en iu formo instruas Esperanton.

Dankon al la gekolegoj, kiuj prizorgas tian instruadon.

Mi petas la gekolegojn: bv. raporti pri viaj kursoj, atingajoj ĉe

instru-german@googlegroups.com, ja via laboro povas esti modelo por aliaj, povas plifortigi la ĝeneralan akcepton, pozitivan prijuĝon de la lingvo.

Bv. ne forgesi registri novajn grupojn kaj ŝanĝojn ĉe malnovaj ĉe <http://edukado.net>, ki troveblas la listo de lerneja Esperanto-grupoj. Kun bedaŭro ni ricevis la novaĵon, ke en kelkaj lernejoj ne plu funkcias E-rondo, ekz. en Günne kaj Hameln.

Retlisto pri lerneja agado, instruado: membriĝu kaj sendu informojn al la dissendolisto:

esperanto-en-lernejojn@googlegroups.com

Unu el la plej sukcesaj agadoj estas la 2-jara Comenius-projekto (2008-2010) por bazlernejoj subvenciata de EU, en kiu partoprenis Nicolai bazlernejo en Herzberg am Harz, Springboard-lernejo en Bar Hill (Britio) kaj bazlernejo en Miskolc (Hungario). La projekto baziĝas sur la lernfaciliga rolo de Esperanto en la fremdlingva instruado kaj rezultis firmiĝantajn amikecojn inter la gelernantoj, gepatroj kaj instruistoj.

Okazis reciprokaj vizitoj kun gepatroj. En oktobro 2009 la hungaroj estis la gastigantoj, kaj la fina renkontiĝo okazis en Herzberg, komence de aprilo 2010.

Ni ŝatus alvoki aliajn kolegojn por studi tiun eblon, ellabori projekton kaj akiri monon por lerneja Esperanto-instruado. Vere indas, ofte temas pri sufiĉe granda monsumo.

2. Universitato:

Estas sekvena ekzemplo la E-instruado ĉe universitatoj. Ni gratulas al ĉiuj instruistoj, kiuj sukcesis lanĉi kursojn en tiu nivelo. Nun ekzistas en 5 lokoj.

Aparte mi mencias, ke D-ro Rudolf Fischer ne nur ellaboris taŭgan lernmaterialon 'Esperanto en dialogo' (vidu ĉe <http://esperanto.de/lehrbuch/index.html>, sed ankaŭ ekzamenas siajn lernantojn laŭ la niveloj de la Komuna Eŭropa Referenckadro.

3. Junulara laboro

Kunlaboro kun Germana Esperanto-Junularo (GEJ), invito al lingvaj kursoj kaj fakseminarioj. Partopreno en instrukapabla kurso, klerigado, studsesioj por junuloj estas subvenciataj. Ni ĝojas pri iniciato de GEJ organizi kunvenojn por sub-18-jaruloj. AGEI planas kelktagan kunvenon ekz. por mezlernejoj.

4. Klerigado, pluklerigado, instrukapabligo

En kunlaboro kun Germana Esperanto-Asocio (GEA): kunordigante farenadojn kun Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg daŭre okazas klerigesioj, seminarioj dum la tuta jaro. Celo: trejni novajn E-instruantojn, zorgi pri ilia kvalifikado, lingva-faka spertiĝo, doni pluklerigeblon al gekolegoj, oferti seminariojn, fakprelegojn. En 2009 la ĉeftemoj estis interlingvistiko literaturo, informado, varbado, gramatiko, metodiko.

Ĉiuj partoprenantoj ricevas atestilon, kiu ebligas kolektadon de kreditpoentoj. Detaloj pri la studsemajnfinoj, klerigofertoj estas legeblaj ankaŭ ĉe <http://ic-herzberg.de> kaj <http://esperanto.de/agei>

Germana Esperanto-Centro / Interkultura Centro Herzberg krom la klerigesioj ofertis ankaŭ aliajn programerojn dum la tuta jaro. Okazis

- lingvokursoj (de komencantoj ĝis perfektigo)
- klerigesioj
- fakseminarioj
- kunsidoj, konferencoj, ktp.

Ni rekomendas ankaŭ la uzadon de la biblioteko de ICH, kiu estas atingebla dum la tuta jaro en la Esperanto-Domo en Herzberg kaj estas je dispono eĉ kun faka konsilado, prunto-servo. Novaĵo: en 2009 pedagogia-metodika fakkolektaĵo fariĝis aparta sekcio de la biblioteko kun multaj lernolibroj, lingvistikaj kaj metodikaj verkoj, vortaroj, gramatiklibroj, instrufilmoj, instruhelpiloj.

Kelkaj lernolibroj, faklibroj, vortaroj, ktp. estas haveblaj, mendeblaj ankaŭ de ICH-libroservo por kursanoj, gekolegoj.

Jen kelkaj ekzemploj: Poŝamiko, serio de trilingvaj Etvortaroj de Ilona Koutny, Tendaraĵoj kaj Nemave edifi de Stefan MacGill, Manlibro pri instruado, ktp.

Juna amiko: ICH kolektas ankaŭ abonojn al Juna amiko, la riĉenhava gazeto por lernemuloj, komencantoj. Tri dikaj numeroj, 3x52 paĝoj/jaro, por nur 14 EUR. Bv. aboni por vi mem aŭ/kaj por viaj kursanoj. Skribu al zsafia.korody@esperanto.de

5. Renkontiĝoj:

La plej gravaj kunvenoj estis la

- jarĉefkunveno de AGEI dum la tradicia, ĉiu-jara Germana Esperanto-Kongreso (GEK, majo 2009 en Herzberg am Harz)

- TORPEDO-5 (Tutlanda Oktobra Renkonto Pedagogia) en oktobro 2009 en Herzberg am Harz. Faka renkontiĝo, spertinterŝanĝo kune kun trejnado de instruemuloj el la tria aĝo enkadre de Grundtvig-projekto kun Pollando kaj Slovakio kun subvencio de EU-programo Dumviva lernado. Aldone al TORPEDO okazis tiu internacia kunveno.

Invititaj prelegantoj estis inter aliaj: Stefan MacGill, Katalin Kovats, Gerald Tucker, Petro Balaz. Ĉefaj temoj: instruado rektmetode per la helpo de la lernolibro de Stano Marcek, ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro, andragogio, instru-metodiko.

6. Kunlaboro kun aliaj organizaĵoj:

- partopreno en la laborkunveno de delegitoj de Federaci-landaj Esperanto-Ligoj (oktobro 2009): kunordigo de agado, jarplanado, komunaj aktivecoj

- partopreno en ILEI-konferenco en Krakovo (Pollando), kie Zsófia Kóródy havis du prelegojn kaj reprezentis AGEI en la komitatkunsido de ILEI. Ŝi estis reelektita en la estraro de ILEI kaj daŭre respondecas pri ekzamenoj, edukcentroj kaj instruista trejnado.

AGEI estas kontenta pri la pozitivaj ŝanĝoj en ILEI, kie la laboro plivigliĝis kaj la organizado funkcias pri travideble, ĉio laŭ la statuto.

- partopreno en Tago de Lernejo dum UK (prelego kaj prezentado), kaj per prelego ankaŭ en la scienca simpozio pri profesoro István Szerdahelyi, gvidinto de la universitata Esperanto-fako en ELTE Universitato en Budapeŝt, Hungario.

7. Ekzamenoj:

kunlaboro kun Germana Esperanto-Instituto kaj UEA. Estas bezono adapti la bazajn lingvoekzamenojn al la postuloj de KER (A1, A2). En oktobro 2009 dum Torpedo s-ro Tucker (GEI) prezentis la unuan version de tiuj ekzamenoj, kiu estas bona bazo por ekhavi konvenan ekzamenspostularon kaj modelajn testojn.

En Germanio okazis la unua sesio de la novtipaj lingvoekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) en Düsseldorf, dum IF 2008/2009.

En aprilo dum PSI en St.Andreasberg okazis la dua sesio, kaj dum GEK/EEK estis denove ŝanco por trapasi la novajn KER ekzamenojn. Dum la jaro la KER-ekzamenoj de UEA/ITK fariĝis popularaj, dum 2009 19 personoj el Germanio partoprenis ilin kaj akiris valoran atestilon pri siaj lingvaj konoj. Ankaŭ dum IF 2009/2010 en Nördlingen okazis sukcesa sesio. La sekva ekzamenssesio en Germanio estos ofertata inter 8-10 oktobro dum la pedagogiaj tagoj TORPEDo-6 en Herzberg am Harz.

ALVOKO: ni rekomendas la novajn KER-ekzamenojn al ĉiuj Esperanto-instruistoj, instruantoj, kursgvidantoj, funkciuloj de GEA, LA-oj, reprezentantoj de asocioj, kluboj. Per ekzameniĝo oni povas akiri proprajn spertojn, ekkoni la nivelojn, postulojn, kaj poste oni povas mem konsili al aliaj, helpi ekzameniĝontojn.

Vian aliĝon al KER-ekzamenoj bv. frue anonci al Zsófia Kóródy zsafia.korody@esperanto.de

Dum grandaj internaciaj renkontiĝoj, UK, ktp., ankaŭ la malnovaj UEA/ILEI ekzamenoj estas ofertataj, se estas sufiĉa nombro de kandidatoj.

OFERTO: la testlibro 'Esperanto de nivelo al nivelo', kiu enhavas po 2 seriojn en B1, B2 kaj C1 niveloj kaj estas bonega helpilo por prepariĝo al la KER-ekzamenoj, estas aĉetebla por 10,50 EUR ĉe Interkultura Centro Herzberg aŭ estas mendebla de Zsófia Kóródy

8. Informado:

AGEI membroj ricevas IPR, en ĉiu numero aperis alvokoj aŭ raportoj pri instru-agado en Germanio. Ili ricevas ankaŭ neregulajn cirkulerojn kun alvokoj, novaĵoj, gravaj sciindaĵoj pri en- kaj eksterlandaj instru-rilataj eventoj, ktp. Informkanalo estas ankaŭ Esperanto aktuell, ĉefa organo de GEA, kiu estas je dispono por instru-rilataj novaĵoj, raportoj. Fakajn artikolojn, kontribuaĵojn, raportojn, ktp. vi povas sendi rekte al la redaktoroj de IPR kaj Esperanto aktuell.

AGEI ekhavis novan hejmpaĝon ligitan al la hejmapaĝo de GEA <http://esperanto.de/agei>

Dum 2009 aperis tie pluraj dokumentoj, helpmaterialoj, ekz. modeltestoj por varbi en VHS-kursoj, oficialaj dokumentoj el Hungario, kiuj science pravas, ke Esperanto estas t.n. moderna vivanta lingvo kaj egalrajta kun aliaj lingvoj, taŭga por ĉiutaga komunikado. Tiuj dokumentoj estis aldonitaj ankaŭ al la argumentado, respondo de AGEI en la diskuto pri lingva diskriminacio, kiu ekestis rilate al „Bundeswettbewerb Fremdsprachen”.

Al retuzantoj ni rekomendas ankaŭ la regulan rigardon de la paĝaro de <http://edukado.net> kaj <http://ilei.info>

Freŝajn informojn vi povas sendi kaj ricevi ankaŭ per la retlisto instru-german@googlegroups.com

Krom bazaj asociaj informoj alvokoj, aktualaĵoj aperadas ankaŭ ĉe <http://esperanto.de/agei>, sub Alvokoj.